



IDEALA KOMBINO

En la Domo de UEA en Rotterdam troviĝas la biblioteko Hodler – unu el la 3 plej grandaj Esperantobibliotekoj de la mondo, kun multaj raraj libroj, periodaĵoj kaj manuskriptoj.

En tiu sama Domo de UEA troviĝas ekde aŭgusto 1972 unuaranga moderna fotokopia aŭtomato, la plej nova kserografia modelo Rank-Xerox 4000. Senfine konserveblaj, klaregaj kopioj sur ambaŭ flankoj de ordinara papero! Granda rapideco: ĝis 45 kopiojn en minuto!

Tiu ideala kombino signifas, ke de nun la tuta riĉaĵo de la Biblioteko Hodler estas tuj disponebla al kolektantoj, literaturamantoj, esperantologoj k.a. en la tuta mondo.

Ĉu vi serĉas malnovan terminaron? praverkon el la 19a jarcento? la plej unuan numeron de Esperanto? elĉerpitan poemaron? Zamenhof-manuskriptojn?

Prezo de unu kopio (formato A4): 0,30 gld. Ekzemplo: kompleta kopio de 200-paĝa libro en kutima formato kostas nur 30,- gld. plus sendokostoj.

FOTOKOPIA SERVO DE UEA

SCIENCA REVUO de
Internacia Scienca
Asocio Esperantista
BEOGRAD (Jugoslavio)

El Vol. 24
n-ro 6(104)
20.11.1973.

ESPERANTOLOGIO KAJ MIKROFOTOGRAFIO

(PRELEGO EN ASOCIO NEDERLANDA DE SCIENCAJ ESPERANTISTOJ, 1973)

(H.G. WANNEMAKERS S.J., MAASTRICHT, NEDERLANDO)^{+/}

1 EFIKA EVOLUO DE LA ESPERANTOLOGIO BEZONAS STUDON DE ĜIAJ ORIGINALAJ DOKUMENTOJ

La tezo ne postulas pruvon, ĉar temas pri ĝenerale akceptita principo en ĉiu scienco, kiu dependas de dokumentoj.

Per aktuala publikaĵo mi volas ĝin ilustrati: En "Scienca Revuo" de la pasinta jaro aperis dupaĝa artikolo de E. Sonnenfeld el Montevideo kun titolo: "De la prafundamento ĝis la bulonja fundamento."/1/ Tie li referencas al "Komuna Esperanto Gazeto" ... en kiu aperis artikolo de Teo Jung sub la titolo: "D-ro Zamenhof iniciatoro de la tempisma konjugacio de Esperanto."/2/

El la publikaĵo de Sonnenfeld mi citas: "La artikolo /de Jung/ estas speciale interesa, ĉar Teo Jung rimarkis ion, kion ŝajne aliaj esperantologoj ĝis nun pretervidis, nome ke en la unua eldono de la "Unua Libro - por Germanoj" - antaŭ nelonge fotoreprese novaperinta - en la regulo 6a de la Gramatiko troviĝas jena teksto pri la pasiva voĉo... en Esperanta traduko:

"Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per helpo de la respektiva formo de la vorto e s t kaj de la participo de la prezenco pasiva de la donita verbo..."/3/ "La teksto, kiu servis kiel bazo en 1905. por la Fundamento... aperas modifita tiel, ke anstataŭ "Participium praesentis passivi" ni legas nur: "participium passivi". Malaperis la vorto p r a e s e n t i s . Ĉu malatento? Certe ne, ĉar en ĉiuj kvin lingvoj la koncerna vorto forestas."

Cetere estus interese scii, ĉu en la 1887. en ĉiuj 5 lingvoj tiu vorto enestis aŭ ĉu nur en la eldono "por Germanoj". Sekvas komento kaj kritiko de s-ro

^{+/} lama Profesoro pri Filozofio en Jogjakarto /Indonezio/

Sonnenfeld: "Teo Jung diras, ke tiu unua lernolibro por Germanoj estis la fonto, el kiu la unuaj germanlingvanoj ĉerpis sian sistemon de t.n. "tempisma konjugacio" por la pasivo, dum la postaj generacioj tion simple imitis. En tio Teo Jung povas esti tre prava. Sed se oni bazas sin sur tiu "Unua Libro" por formi ĉiujn tempojn de la pasivo per -ata /prezenca pasivo/, kiel oni do venis al la pluskvamperfekto akre defendata de la "tempisma" skblo /ekz. "estis farita"/?"

Sonnenfeld plurais:

"Mi neniel intencas ĉi tie remalfermi la diskutojn pri ata/ita, sed nur ekzameni la signifon de tiu nun rivelita teksto. Se ĝi estis tiel intencita de Zamenhof... ni povus nur konkludi, ke Zamenhof siatempe certe planis pasivon pli konforman al la eŭropaj lingvoj. Kun la sola formo -ata nature malaperus ĉiu diskuto pri ata/ita kaj ni havus la formojn: estis farata - estos farata - estus farata - estu farata. La participoj farita kaj farota servus nur por uzado sen la helpverbo esti... ne ekzistus la formo "estis farita". Inter la Prafundamento /Unua Libro - eldono 1887./ kaj la definitiva Fundamento /1905./... la lingvo trapasis evoluon kaj certe Zamenhof devis rimarki, ke ne eblis limigi la formojn ita kaj ota al nura participa uzo..."

Tiel iom resume la komento de Sonnenfeld al la artikolo de Jung. Sekvu nia propra komento: Unue ni konstatas, ke la observo de Teo Jung kaj la referenco de Sonnenfeld havas kiel elirpunkton la fotorepresan eldonon de la "Unua Libro - por Germanoj". Tial Sonnenfeld povis formuli kerne kaj prave: En la Fundamento el la 1905. "malaperis la vorto praesentis" el la originala Unua Libro de Zamenhof. Due ni povas konstati, ke same sagace Sonnenfeld aldonas: "Ĉetero estus interese scii, ĉu en la 1887. en ĉiuj 5 lingvoj tiu vorto enestis aŭ ĉu nur en la eldono por Germanoj." Por li tiu konstato estis neebla, ĉar mankas al li fotokopioj de la "Unua Libro" en la aliaj lingvoj.

Antaŭ kelkaj jaroj mi petis s-ron Butler en Londono, ke li farigu por mi mikrofotojn de tiuj aliaj eldonoj. Tiel mi estas nun en la favora situacio respondi al tiu demando de s-ro Sonnenfeld. Mi kontrolis la anglan kaj francan eldonojn; ankaŭ tie ĉeestis resp. la franca *présent* kaj la angla *present*.

Ankoraŭ sekvu tikla konstato! El la artikolo de s-ro Sonnenfeld ni krome povas citi:

"La teksto, kiu servis kiel bazo en 1905. por la Fundamento, troviĝas ankaŭ fotoreproduktita en la 9-a eldono, kaj tie la sama teksto aperas modifita, tiel anstataŭ "Participium praesentis passivi" ni legas nur "Participium passivi". Malaperis la vorto "praesentis".

Ĉu s-ro Sonnenfeld mem legis tiun tekston en la 9-a eldono?/4/ Se jes, tiam li pretervidis en tiu sama eldono sur paĝo 298 noton p: "la kvin UL enhavis la komunan jenan tekston: kaj la participo pasiva prezenca. Poste Zamenhof forigis la adjektivon: prezenca /en la partoj a.g.r.p./." Do ne temas pri tute nova trovaĵo de Teo Jung, ĉar ĉi tiu konstato jam troviĝas en la 9-a eldono de la Fundamento, eldonita de A. Albault en la jaro 1963. Krome superflue estis la demando de s-ro Sonnenfeld, al kiu troviĝas la respondo jam en tiu sama 9-a eldono!

Konklude ni povas diri: fotokopioj ne povas manki, sed ili ne malhelpas ĉiun eraron. Kompletige ni povas aldoni, ke en la "Unua Libro" por Svedoj el la jaro 1889. same troviĝas la vorto: "*presensparticip*" /5/. Krome en la el-

dono de Geoghegan de Uppsala de la 1898. ankoraŭ ĉeestas la angla termino: "*present*". /6/

Por fine trakti ĉi tiun temon: Sur la sama paĝo s-ro Albault mencias en la noto 23; ke en la franca eldono en la 1905. restis tiu fama vorto, prezenca kaj eĉ akiris la aldonon: aŭ preterita. /7/ En la menciita noto pli referencas: Vidu la ĝeneralan enkondukan noticon: p 12. Tie li skribas: "De Beaufront... ĉiam emis komenti kaj li tre certe diskutis kun Zamenhof pri diversaj punktoj... Rezultas el tio, ke la franca Gramatiko estas iom malsama de la aliaj: ĉefe en la sesa Regulo, en la lasta alineo pri la pasivaj verboj. Komprenoble, Zamenhof donis sian aprobon; li eĉ modifis tiun saman alineon en la aliaj kvar Gramatikoj; tamen li ne modifis ilin tiel draste, aŭ pli ĝuste ne same, kiel faris de Beaufront".

2 POR KONSULTI LA ORIGINALAJN DOKUMENTOJN NECESAS MODERNA REPRODUKTADO, UNUALOKE LA FOTOREPRESADO

Pro tio, ke la originalaj dokumentoj estas malmultaj kaj krome troviĝas disse en pluraj lokoj, necesas por konsultado moderna fotoreproduktado: Unualoke meritas nian atenton la fotorepresado, kiu jam kelkajn jardekojn ebligis represi elĉerpitajn eldonojn. Ankaŭ en Esperantujo tiu tekniko estis uzata, ekz. ĉe represo de la Plena Vortaro. /8/

Aparte menciinda estas tiu metodo rilate al la Esperantologio, kiam temas pri represo de antikvaĵoj kun dokumenta valoro. Tiel aperis jam en la 1925. ĉe la Esperantista Centra Oficejo en Parizo, reeldono laŭ fotografa reprodukto de la libro de D-ro Esperanto: Aldono al la "Dua Libro de l' Lingvo Internacia", originale eldonita de A. Kelter en Varsovio, 1889. /9/

Aperis en Helsinko en la 1948.: Dro Esperanto: Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro por Rusoj, kiel eldono de Vilho Setälä. Faksimile represita en 250 ekzempleroj. /10/

En la jaro 1967. ĉe la eldono Koko en Kopenhago sekvis kvar antikvaĵoj:

1. La Neĝa Blovado, rakonto de A. Puŝkin, trad. A. Grabowski, en la 1888. /11/
2. Princino Mary, rakonto de M. Lermontov, trad. E. de Wahl, en la 1889. /12/
3. La Gefratoj, komedio en unu akto, de Goethe, trad. A. Grabowski, en tiu sama jaro 1889. /13/
4. Du rakontoj en unu volumeto: La Nova Jaro, de Boleslav Prus, kaj Jankomuzikanto, de H. Sienkiewicz. Ambaŭ el la lingvo pola trad. A. Grabowski, en la 1891. /14/

Unu jaron poste, en la 1968., nove eldonis laŭ fotorepreso Artur E. Iltis en Saarbrücken du libretojn:

1. Dro Esperanto, Internationale Sprache. Vorrede und vollständiges Lehrbuch, por Germanoj. Warschau, 1887. /15/
 2. L. Zamenhof: Granda Vortaro Germana-Esperanta. Kajero 1, Odeso, 1894. /16/
- Fine tre grava estis jam en la jaro 1963. la apero de la menciita 9-a eldono de la Fundamento de Esperanto, en kiu estas fotokopiita la unua eldono de 1905. /17/

Tiu fotorepresado posedas klarajn avantaĝojn: La represo estas tuj legebla, sen aparato. Ili estas, kiel eldonejo Koko ĉiufoje mencias: fidela laŭ la originalo. Kaj la prezo estas modera. La metodo estas uzbla, kiam temas pri libro reeldoninda, do kiam oni prave povas atendi sufiĉan kvanton aĉetotan. Ne taŭgas la metodo, se oni deziras nur unu aŭ kelkajn ekzemplerojn.

3 LA FOTOKOPIA SERVO DE UEA SIGNIFAS GRAVAN PROGRESON

Certe temas pri tute nova servo, pri kiu nin informas jarlibro, parto dua, de la pasinta jaro. /18/

Jen la prezento de la nova servo sub titolo: "Ideala Kombino. En la Domo de UEA en Rotterdam troviĝas la biblioteko Hodler - unu el la tri plej grandaj Esperanto-bibliotekoj de la mondo, kun multaj raraj libroj, periodaĵoj kaj manuskriptoj. En tiu sama Domo de UEA troviĝas ekde aŭgusto 1972. unuaranga moderna fotokopia aŭtomato, la plej nova kserografia modelo Rank-Xerox 4000. Senfine konserveblaj, klare kaj koptoj sur ambaŭ flankoj de ordinara papero! Granda rapideco: ĝis 45 kopiojn en minuto! Tiu ideala kombino signifas, ke de nun la tuta riĉaĵo de la Biblioteko Hodler estas tuj disponebla al kolektantoj, literaturamantoj, esperantologoj k.a. en la tuta mondo. Ĉu vi serĉas malnovan terminaron? praverkon el la 19a jarcento? la plej unuan numeron de Esperanto? elĉerpitan poemaron? Zamenhof manuskriptojn? Prezo de unu kopio /formato A4/: 0.30 gld. Ekzemplo: kompleta kopio de 200-paĝa libro kostas nur 30.-gld. plus sendkostoj."

Sekvas modesta listo de 13 titoloj kun enkonduka informo: "La Fotokopia Servo proponas: pretajn, kompletajn kaj tuj liveriblajn fotokopiojn de la ĉi-sube listigitaj verkoj. Ĉiu kompleto en plasta bindaĵo."

En la listo troviĝas inter aliaj:

La Esperantisto /1889-1891/ eldono de Chr. Schmidt, poste de L. Zamenhof. La unuaj du jarkolektoj de la unua gazeto de Esperanto, de n-ro 1 /sept. 1889/ ĝis n-ro 11-12 de la jaro 2 /nov-dec. 1891/. Entute 122 p. grandformataj. Eld. en Nurnbergo. Prezo: 37.60 gld.

Eterna Bukedo, poemoj el dudekdu lingvoj /1931./ tradukis Kalocsay. 351 p. 54.60 gld. Kun biografiaj-kritikaj notoj pri la poetoj kaj rimarkoj poetikaj de la tradukinto. Elstara antologio, multe influanta la Esperantan poezion.

Galerio de Zamenhofoj /1924./ kompilis Edvardo Wiesenfeld. 40 p. plus 18 portretoj kaj geneologia arbo de la familio Zamenhof. Prezo: 13.30 gld. Biografaj studoj.

Streĉita Kordo /1931./ K. Kalocsay. 189 p. prezo: 31.50 gld. Originala poemaro, mejloŝtono en la Esperanta poezio.

Ankaŭ la tuta listo estas nur ekzemplo; sur stencilita listo same de novembro '72 troviĝas jam 20 titoloj. Krome kun la indiko por mendoj sendotaj al adreso en Nederlando, ke oni aldonu 4% pro la imposto. Ĉi tiuj fotokopioj estas tre konvenaj pro la fakto, ke ili estas tuj legeblaj, sen bezono de aparato por ilin grandigi. La metodo tre taŭgas, se temas pri nemultaj paĝoj, pri artikoloj ne tre ampleksaj, pri kelkaj paĝoj el pli grandaj verkoj. Male, kiam oni bezonas multajn paĝojn, la metodo montriĝas sufiĉe multekosta. Ankaŭ kiam oni ne scias, kie en libro troviĝas la teksto dezirata, kaj oni ne povas antaŭe konsulti la fonton mem por precizigila lokon, ne konvenas ĉi tiu metodo same pro la grandaj kostoj.

Fine, rilate al bibliotekoj, en kiuj oni deziras fari stokon da fotokopioj, ĉi tiu metodo estas neebla pro tiuj kostoj. La aplikado de ĉi tiu tekniko kaj la fotokopia servo do vere donas novajn kaj gravajn eblojn, sed inter certaj nevastaj limoj. Ili ne donas universalan solvon.

4 DEFINITIVAN SOLVON POVAS DONI NUR LA MIKROFOTOGRAFIO

Ni konfesu, ke unuavide la tekniko de mikrofotografio ne estas tiel alloga. Oni ja bezonas specialan aparaton por fari mikrofotojn; kaj krome oni bezonas aparaton por legi ilin. Sub tiuj aspektoj la avantaĝoj de la fotokopio estas klaraj. Tamen tute ne temas pri konkurenco!

Male. Ĝuste, kie la fotokopio ne plu estas ebla, tie donas la mikrofotografio taŭgan solvon. Kiel konate, ekzistas du specoj de mikrofotografio: sur mikrofilmo kaj sur mikrokarto. Ambaŭ konsistas el tavolo de impresebla materialo sur celuloideo, do trarivebla. Mikrofilmo troviĝas sur kelkmetra strio en bobeno, konservenda en skatoloj. Mikrokarto povas esti diversformataj, ekz. de 12,3 kaj 7,3 cm. Ili posedas plurajn avantaĝojn: oni povas konservi ĉiun el ili en aparta kovrilo; ĉe la supra rando oni povas indiki per tuj legebla teksto la enhavon de la karto; facile oni povas ordigi ilin en stoko. Ĉe grandigo de la origina teksto ekz. 20-foje oni povas kunmeti sur unu karto ekz. 32 aŭ 64 paĝoj depende de la formato de tiuj paĝoj. Sed ekzistas ankaŭ teknikoj, per kiuj oni povas malgrandigi ĝis 150-foje. Tiamaniere oni do ŝparas multan spacon en arkivejoj kaj bibliotekoj. Krome sendado de tia materialo estas multe pli konvena kaj malmultekosta.

Ĉi tiu metodo estas aplikebla pogrande: ne gravas ĉu libro estas multpaĝa aŭ grandformata, ĉu revuo konsistas el multaj jarkolektoj. Eblas ĉi ĉio ĝuste pro la fakto, ke la prezo estas tre favora! Dum unupaĝa fotokopio kostas 30 cendojn, la Inter Documentation Company en Svisujo anoncas: "Mendu viajn mikrokartojn ĉe ni je unu cendo por paĝo". /19/

Tiu komparo tamen ne estas tute honesta, ĉar eblas mendi fotokopion de unu paĝo, sed oni ne farigas mikrokarton de unu paĝo! Kontraŭe estas malkonvene farigi cent fotokopiojn pro la kostoj, sed mikrofotoj de la sama kvanto je konvena prezo estas eblaj. Kiel dirite: tute ne temas pri konkurenco! Male, la tri metodoj de fotoreproduktado: la fotorepresado /por normala merkato/, la fotokopio /por malmultaj paĝoj/, kaj la mikrofotografio /ankaŭ pogrande/, kompletigas unu la alian.

5 MIKROFOTOGRAFIA SERVO NUNTEMPE ESTAS REALIGEBLA

Okaze de la 27-a Kongreso de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista en Vieno mi jam prelegis pri Mikrofotografio. Tio estis en la jaro 1958. Tiam tia servo ankoraŭ ne estis realigebla. Mi memoras, ke mi montris tute novan aparaton por legi mikrofotojn. Temis pri nederlanda produkto, kiu ankaŭ en sciencaj rondoj en nia lando estis novaĵo. Krome la farado de la mikrofotoj mem estis en eksperimenta stato. Tiam troviĝis nur kelkaj aparatoj en Nederlando. Pasis dekkvin jaroj. La tekniko evoluis kaj eĉ populariĝis. Pluraj bibliotekoj posedas propran stokon de libroj, revuoj, dokumentoj sur mikromaterialo. La sama katalogo de IDC mencias, ke ili dum 15 jaroj faris mikrofotojn de 250.000 volumoj!

En Esperanto ekzistas ankoraŭ ne multa literaturo pri ĉi tiu temo. Detala studo troviĝas en "Scienca Revuo", 1970 de Simeon Simeonov, en Sofio, kun la titolo: "Nuntempa scienca informado kaj dokumentado nun aparta konsidero

de la lingvaj problemoj." /20/ Estas teksto de prelego en Internacia Somera Universitato, Helsinko, 1969. Je la fino troviĝas Bibliografio plurlingva, tie Esperanto ankoraŭ ne ĉeestas. Tiu ĉi studo donas multajn informojn kaj ilustraĵojn. Krome li mencias plurajn sistemojn kune kun komputiloj por aŭtomata retrovo de dokumentoj. Jam temas pri imponaj stokoj.

Apartan konsideron meritas la traduko de Zamenhof de la Malnova Testamento, pri kiu li laboris dum la lastaj jaroj de sia vivo kaj dum la unua mondmilito. Lia traduko aperis definitiva en la 1926., do post lia morto. Tial el esperantologia vidpunkto tre valoras la tajpitaj folioj, kiujn li konfidis al la Brita Komitato pri eldono de la Biblio en Esperanto, kiu fidele uzis ilin. S-ro W.J. Downes, kiel kuratoro, havas la kompletan manuskripton. /21/

Por ĉiu studo pri la Esperanto-Biblio do estas tre grave, ke ni povas konsulti tiujn foliojn. En ĉi tiu kazo mikrokopiado estas ne nur vere bona, sed necesa. Parence al tiu situacio estas la sorto de tiu Biblio kaj de ĝiaj partoj. Pri tio verkis s-ro G. Rust tre riĉan bibliografion. Kun la titoloj: "Historio pri la Esperanto-Biblio" kaj: "Aldonoj al la Historio pri la Esperanto-Biblio" aperis du artikoloj en "Biblia Revuo". /22/

Klare montriĝas, kiel dise en la Esperanto-Literaturo troviĝas tiom da diversaj eroj. Estis vere giganta tasko kolekti tiom da tiel disa materialo. Kolektado el ĝi sur mikrokarto donos unikan eblon por pristudi tiujn tekstojn mem. Tiuj ĉi du ilustraĵoj sufiĉu por montri la valoron kaj neceson de tiu moderna reproductado por sana scienca progreso ankaŭ sur aliaj terenoj en Esperanto.

FINA VORTO

En fina vorto mi ankoraŭ iom pli detale volas konsideri la eliran tezon de ĉi tiu prelego: "Efika evoluo de la Esperantologio bezonas la studon de ĝiaj originalaj dokumentoj".

Pli detale ni nun povas formuli pri kiuj dokumentoj temas. Estas la frukto de ambaŭ studoj de s-roj Jung kaj Sonnenfeld, ke ni konsciiĝis pli ol antaŭe pri la graveco de la periodo inter la Unua Libro en la 1887. kaj la Fundamento de Esperanto en la 1905. En tiu periodo la lingvo evoluis ĝis sia matura kaj definitiva formo! Je la fono de tiu konsidero ni povas aserti, ke ĉiuj dokumentoj el tiu periodo estas la aŭtentikaj atestoj pri tiu evoluo. Kaj ĉiuj dokumentoj apartenantaj al la Unua Kongreso en Bulonjo-ĉe-Marco kune estas kvazaŭ la supra volbĉono de tiu periodo!

Se ni povas konsenti pri ĉi tiu konstato, sekvas la konkludo, ke ni per moderna reproductado malfermu ĉiujn tiujn dokumentojn kaj disvastigu ilin tiel, ke ĉiu Esperantologo pri ili povos disponi. Tion ebligas la aplikado de la mikrofotografio!

NOTOJ:

- 1/ E. Sonnenfeld: "De la prafundamento ĝis la bulonja fundamento", en "Scienca Revuo", 1972, 77-78.
- 2/ Teo Jung: "D-ro Zamenhof iniciatoro de la tempisma konjugacio de Esperanto", en "Komuna Esperanto Gazeto", 1971, 103-104.

- 3/ D-ro Esperanto: Internationale Sprache. Vorrede und vollständiges Lehrbuch, por Germanoj, Warschau, 1887, fotorepresita eldono de Artur E. Iltis, Saarbrücken, 1968.
- 4/ L. L. Zamenhof: Fundamento de Esperanto. Naŭa eldono, kun Enkondukoj, Notoj kaj Lingvaj Rimarkoj de D-ro A. Albault. Eldonita de Esperantaj Francncaj Eldonoj, 1963, 299 kaj 298 noto sub litero P.
- 5/ Dr. Esperanto: Internationelt Språk. Företal och Fullständig Lärobok, por Svedoj. Öfversättning verkställd af G. Henriclundquist, Warschau, 1889, 37.
- 6/ Dr. L. Zamenhof: The international language "Esperanto". Complete Instruction-Book with two Vocabularies, translated after the Russian by R. H. Géoghegan, Uppsala, /1898/, 16.
- 7/ p. 298 noto 23; krome sur paĝo 54.
- 8/ Tria eldono. Enkonduko.
- 9/ D-ro Esperanto: Aldono al la "Dua Libro de l' Lingvo Internacia", originale eldonita de H. Kelter, Varsovio, 1889.
- 10/ D-ro Esperanto: Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro por Rusoj. Faksimila eldono de Vilho Setälä, Helsinko, 1948. /Vd. Esperantologio, 1, 143/.
- 11/ A. Puŝkin: La Neĝa Blovado, trad. A. Grabowski, originale eldonita en Varsovio, 1888.
- 12/ M. Lermontov: Princino Mary, trad. E. de Wahl, originale eldonita de L. Zamenhof mem, en Varsovio, 1889.
- 13/ Goethe: La Gefratoj, komedio en unu akto, trad. A. Grabowski, originale eldonita de Zamenhof mem, en Varsovio, 1889.
- 14/ Boleslav Prus: La Nova Jaro; H. Sienkiewicz: Janko-Muzikanto. Ambaŭ el la lingvo pola trad. A. Grabowski, originale eldonita de W. Tümmel en Nurnbergo, 1891.
- 15/ D-ro Esperanto: Internationale Sprache. Vorrede und vollständiges Lehrbuch, por Germanoj. Warschau, 1887.
- 16/ L. Zamenhof: Granda Vortaro Germana-Esperanta, kajero 1, eldonita de L. Zamenhof en Odeso, 1894.
- 17/ vidu noton 4, p. 26.
- 18/ Jarlibro de U.E.A., Dua Parto, 1972, 300-302.
- 19/ Inter Documentation Company AG, Poststrasse 14, 6300 Zug, Svisujo: "Selected Titles from LDC's Microfiche Projects". Lasta paĝo: "Order your copies from us for one cent a page".
- 20/ Simeon Simeonov: "Nuntempa scienca informado kaj dokumentado kun aparta konsidero de la lingvaj problemoj", en "Scienca Revuo", 1970, 81-92.
- 21/ W.J. Downes, en "Dia Regno", 1973, 1649.
- 22/ G. Rust: "Historio pri la Esperanto-Biblio" kaj "Aldonoj al la Historio pri la Esperanto-Biblio", en "Biblia Revuo", 1969, 261-278; kaj 1970, 37-41.